# ESK Intervjuas EKDE TIAM

## speciala gasto en Adelajdo 2019



**Kiuj vi estas? Kion vi faras?**

Ni estas Ĝo kaj Petro de Melburno - kune ni estas EKDE TIAM! Petro ludas la tamburon kaj mi kreas ĉiujn aliajn sonojn per komputilo kaj kantas. Ni ambaŭ estas parto de la kreado de kantoj; la kernon kaj la tekston kreas mi, kaj Petro multe laboras pri aranĝado, miksado ktp.

**Kiom longe vi estis en EKDE TIAM?**

Ni eklaboris pri la unua kanto frue en 2017, sed ni havis sufiĉan tempon forte labori ĝis 2018.

**Kian muzikon vi ludas?**

Ni ludas alternativan sintez-popon en Esperanto, tamen ni ofte vagas iom for de tio. En unu kanto mi eĉ repas!

(*repo -la nomo devenas de la angla Rap kiu estas mallongigo de ¨rimo kaj poezio¨ angle Rhyme And Poetry. -Red.*)

**Kiajn defiojn vi trafis verkante en Esperanto?**

La vortoj kiujn mi volas uzi estas ofte tro longaj. Kaj kutime miaj unuaj pensoj por teksto estas en la angla, do mi devas halti kaj rekomenci Esperante. Sed vere, freŝa verkado ne estas tiel malfacile - la malfacileco venas kiam oni decidas traduki anglan kanton en Esperanton. Mi verkis plurajn kantojn por pasinta bando sed estis por mi tro malfacila tasko bone traduki ilin, do ni simple verkis novajn kantojn en Esperanto.

**Kia muziko influas vin, kio influas vian verkadon?**

Preskaŭ ĉio influas nin, kiam ni bezonas inspiron. Ne nur muziko sed la ĉiutagaj sonoj ĉirkaŭ nin, kaj okazaĵoj en niaj vivoj kaj en la novaĵo. Ekzemple, unu el niaj kantoj evoluiĝis de nia penado instrui al mia patro rudimentaĵon de tamburistoj. Alia estis amkanto kiu ŝanĝiĝis kiam mi aŭdis pri la seksperforto kaj murdo de juna virino kiu trapasis parton de sia lasta vespero en nia strato.

**Mi aŭdas ke vi baldaŭ eldonos albumeton- ĉu tiuj kantoj estos parto de ĝi?**

Jes, ni celas eldoni 4-kantan albumeton antaŭ la fino de la jaro, kaj ambaŭ el tiuj kantoj estos inkluzivitaj.

**Kie homoj povas aŭdi vin?**

Ni ludos ĉe la kongreso en Adelajdo en Januaro - do certe venu al tio! Se vi volas aŭdi nin antaŭ tiam, sekvu nin ĉe la sekvaj lokoj por aŭskulti unu kanton, kaj scii kie aliloke ni koncertos:

**Facebook:** https://www.facebook.com/ekdetiam
**Instagram:** https://www.instagram.com/ekdetiam/
**Twitter:** https://twitter.com/ekdetiam
**Soundcloud:** https://soundcloud.com/ekdetiam